

Espero Katolika



Numero 10-12/2010

Oktobro-December 2010



Sur la kovrilo: *Esperantistoj omaĝis al pastro Stefano Hawkes-Teeples okaze de lia eldiro de la finaj votoj kiel jezuito, en la roma preĝejo "del Gesù" (v. p. 76).*

ENHAVO

“KRISTNASKO ESTAS MOTIVO DE ESPERO POR ĈIU HOMO”

Mesaĝo de la Papo por Kristnasko 2010	63
Esperantistoj aperis trifoje en la monda televida elsendo	64

“LUMO DE LA MONDO”

Resumo de la libro-intervjuo kun Benedikto la 16a	65
--	----

IKUE HAVAS NOVAN STATUTON

Rezulto de la referendumo por ĝia aprobo kaj ĝiaj ĉefaj novaĵoj	66
La kompleta teksto de la nova statuto	67

MIAJ KVAR VOTOJ KIEL JEZUITO

P. Stefano Hawkes-Teeples eldiris la lastajn votojn kiel jezuito	76
---	----

FORPISIS PASTRO FELICE RUARO

Rememore pri la iama redaktoro de Espero Katolika	78
Letero de la Episkopo de Verono al IKUE	79

Radio Vatikana, 75 - Landaj Reprezentantoj, 80

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Prezidanto:** Miloslav Švábek - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Stanisław Śmigielski - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.



Mesaĝo de Benedikto la 16a por Kristnasko 2010

KRISTNASKO ESTAS MOTIVO DE ESPERO POR ĈIU HOMO

Karaj gefratoj, kiuj aŭskultas min de Romo kaj de la tuta mondo, kun ĝojo mi anoncas al vi la mesaĝon de Kristnasko: Dio fariĝis homo, loĝis inter ni. Dio ne estas malproksima: Li estas proksima, eĉ, Li estas la “Emanuelo”, Dio-kun-ni. Li ne estas nekonato: Li havas vizaĝon, tiun de Jesuo.

Tio estas mesaĝo ĉiam nova, ĉiam surpriza, ĉar ĝi preterpasas ĉian nian plej aŭdacan esperon. Precipe ĉar ĝi ne estas nur anonco: ĝi estas evento, okazintaĵo, kiun fidindaj atestantoj vidis, aŭdis, tuŝis en la Persono de Jesuo el Nazareto! Estante kun Li, observante

Liajn agojn kaj aŭskultante Liajn vortojn, ili rekonis en Jesuo la Mesion; kaj vidante Lin resurektinta, post Lia krucumado, ili havis la certecon ke Li, vera homo, estis samtempe vera Dio, la solenaskita Filo veninta el la Patro, plena je graco kaj vero (kp *Joh* 1,14).

“La Vorto fariĝis karno”. Fronte al ĉi tiu revelacio, unu plian fojon elstaras en ni la demando: kiel tio estas ebla? La Vorto kaj la karno estas realaĵoj inter si kontraŭaj; kiel povas la Vorto eterna kaj ĉiopova fariĝi homo fragila kaj mortema? Estas nur unu respondo: la Amo. Kiu amas, tiu volas dividi kun la amato, volas esti kuniĝinta kun li, kaj la Sankta Skribo prezentas ĝuste la grandan historion de la amo de Dio al sia popolo, kulminanta en Jesuo Kristo.

En la realo, Dio ne ŝanĝiĝas: Li estas fidela al Si mem. Tiu kiu kreis la mondon estas tiu sama kiu vokis Abrahamon kaj revelaciis sian Nomon al Moseo: Mi estas, kiu estas... la Dio de Abrahamo, de Isaako kaj de Jakobo... Dio indulgema kaj kompatema, riĉa je amo kaj je fideleco (kp *Eli* 3,14-15; 34,6). Dio ne ŝanĝiĝas, Li estas Amo de ĉiam kaj por ĉiam. Li estas en Si mem Komuneco, Unueco en la Triunuo, kaj ĉiu Lia faro kaj vorto celas la komunecon. La enkarniĝo estas la kulmino de la kreado. Kiam en la sino de Maria, per la volo de la Patro kaj la agado de la Sankta Spirito, formiĝis Jesuo, Filo de Dio fariĝinta homo, la kreitaro atingis sian verton. La ordiganta principo de la universo, la *Logos*, komencis ekzisti en la mondo, en iu tempo kaj en iu spaco.

“La Vorto fariĝis karno”. La lumo de ĉi tiu vero manifestiĝas al tiu, kiu ĝin akceptas kun fido, ĉar ĝi estas mistero de amo. Nur tiuj, kiuj malfermiĝas al la amo estas envolvitaj de la lumo de Kristnasko. Tiel estis en la nokto de Betlehemo, kaj tiel estas ankaŭ hodiaŭ. La enkarniĝo de la Filo de Dio estas evento kiu okazis en la historio, sed samtempe ĝin preterpasas. En la nokto de la mondo ekbrilas nova lumo, kiu lasas sin vidi de la simplaj okuloj de la fido, de la koro milda kaj humila de tiu, kiu atendas la Savanton. Se la vero estus nur matematika formulo, iasence ĝi plensukcesus per si mem. Se kontraŭe la Vero estas Amo, ĝi postulas la fidon, la “jes” de nia koro.

Kaj kion serĉas, efektive, nia koro, krom Vero kiu estu Amo? Ĝin serĉas la infano, per siaj demandoj, tiel naivaj kaj stimulaj; ĝin serĉas la junulo, bezonanta trovi la profundan sencon de sia vivo; ĝin serĉas la viro kaj la virino en sia matureco, por gvidi kaj subteni la sindevigon en la familio kaj en la laboro; ĝin serĉas la maljunulo, por doni plenumon al la surtera vivo.

“La Vorto fariĝis karno”. La anonco de Kristnasko estas lumo ankaŭ por la popoloj, por la kolektiva irado de la homaro. La “Emanuelo”, Dio-kun-ni, venis kiel Reĝo de justeco kaj de

paco. Lia Regno – tion ni scias – ne estas el ĉi tiu mondo, kaj tamen ĝi estas pli grava ol ĉiuj regnoj de ĉi tiu mondo. Ĝi estas kvazaŭ fermentaĵo de la homaro: se ĝi mankus, malaperus la forto kiu antaŭenigas la veran evoluon: la instigo kunlabori por la komuna bono, al la malegoisma servo favore al la proksimumo, al la paca batalado por la justeco. Kredi en la Dio kiu volis kunpartopreni nian historion estas konstanta kuraĝigo al sindevigo en ĝi, ankaŭ meze de ĝiaj kontraŭdiroj. Ĝi estas motivo de espero por ĉiuj tiuj kies digno estas ofendata kaj malrespektata, ĉar Tiu kiu naskiĝis en Betlehemo venis liberigi la homon el la radiko de ĉia sklaveco.

La lumo de Kristnasko denove brili en tiu Lando kie Jesuo naskiĝis, kaj inspiru Israelanojn kaj Palestinanojn en la serĉado de kunvivo justa kaj paca. La konsola anonco de la veno de Emanuelo mildigu doloron kaj konsolu en la elprovoj la karajn kristanajn komunumojn en Irako kaj en la tuta Mezoriento, havigante al ili konsolon kaj esperon por la estonteco kaj animante la Responsulojn de la Nacioj al agoplena solidareco al ili. Tio ĉi okazu ankaŭ favore al tiuj kiuj en Haitio ankoraŭ suferas pro la sekvoj de la katastrofa tertremo kaj de la ĵusa epidemio pri ĥolero. Tiel same ne estu forgesataj tiuj kiuj en Kolombio kaj en Venezuelo, sed ankaŭ en Gvatemalo kaj en Kostariko, estis trafitaj de la ĵusaj naturaj plagoj.

La naskiĝo de la Savanto malfermu perspektivojn pri daŭrema paco kaj de aŭtentika progreso al la loĝantaroj de Somalio, de Darfuro kaj de Eburbordo; ĝi akcelu la politikan kaj socialan stabilecon de Madagaskaro; alportu sekurecon kaj respekton al homaj rajtoj en Afganio kaj en Pakistano; kuraĝigu la dialogon inter Nikaragvo kaj Kostariko; favoru la repaciĝon en la Korea duoninsulo.

La celebrado de la naskiĝo de Redemptoro plifortigu la spiriton de fido, de pacienco kaj de kuraĝo en la fideluloj de la Eklezio en kontinenta Ĉinio, por ke ili ne senkuraĝiĝu pro la limigoj al ilia libereco de religio kaj de konscienco kaj, persistante en la fideleco al Kristo kaj al Lia Eklezio, ili gardu vivanta la flamon de la espero. La amo de la “Dio kun ni” donu persistemon al ĉiuj kristanaj komunumoj kiuj trasuferas diskriminacion kaj persekuton, kaj inspiru la politikajn kaj religiajn estrojn sindevigi por la plena respekto de ĉies religia libereco.

Karaj gefratoj, “la Vorto fariĝis karno”, loĝis inter ni, Li estas la Emanuelo, la Dio kiu fariĝis proksima al ni. Ni kontemplu kune ĉi tiun grandan misteron de amo, ni lasu prilumigi nian koron de la lumo kiu brilas en la groto de Betlehemo!


Bonan Kristnaskon al ĉiuj!

(tradukis: Antonio De Salvo)

**La kristnaska parolado estas en YouTube, kun subtitoloj en Esperanto:
<http://www.youtube.com/watch?v=gG00xblHVCw&feature=channel>**

Post la kristnaska mesaĝo la Papo eldiris siajn bondezirojn en 65 lingvoj, inkluzive de Esperanto: “Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!”. Por la 19a fojo grupo de esperantistoj ĉeestis por levi alte la panelojn kiuj konsistigas la vorton “Esperanto”. Ĉeestis: Giovanni Conti, Antonio De Cristofaro, Patrizio Cilli, Elio Bonomolo, Jitka Skalická, Giovanni Daminelli, Felice Sorosina, Claudio Polvanesi, Loredana Redivo, Ranieri Clerici, Isabel León Fonseca, Renato Corsetti, Filomena Canzano. Kiel kutime, multaj preterpasantoj petis informojn pri Esperanto. Trifoje la tutmonda televidelsendo montris la panelojn. Vespere la ĵurnalo de la 3a ŝtata televid-kanalo de Italio (RAI3), dum longa raporto pri la papa parolado, informis pri la E-lingva bondeziro jene: “La Papo esprimis la kristnaskajn bondezirojn en 65 diversaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, la lingvo de la paco”. Vasta raporto aperas en la IKUE-paĝaro: <http://www.ikue.org/kristnasko2010/kristnasko2010.htm>





En ĝi Benedikto la 16a parolas pri sia ĉiutaga vivo kaj pri la grandaj aktualaj temoj. “Hodiaŭ – li diras - necesas reanunci per novaj vortoj, ke Dio estas amo, al homaro, kiu ne plu komprenas ke la sango de Kristo estis verŝita sur la kruco por la forigo de niaj pekoj, por la elaĉeto, la savo de ĉiuj. Temas pri grandaj kaj veraj formuloj, sed kiuj estas jam nun for el nia rezonado, pli kaj pli markita de praktika ateismo”.

La Eklezio ekzistas por anonci ĉi tiun Veron, malgraŭ la skandaloj, kiuj vundas ĝin. Kaj tamen ĉi-lastaj montras ke ĝuste Jesuo fondis ĝin: “se dependus de la homoj, la Eklezio jam de multe da tempo estus droninta”. Sed kun la skandaloj, estas ankaŭ multaj signoj de espero: novaj iniciatoj en la Eklezio, kiuj ne naskiĝas el strukturoj aŭ burokratioj, sed “deinterne”, el la ĝojo de la gejunuloj.

Kristanismo verŝajne alprenos novan vizaĝon, verŝajne ankaŭ malsaman kulturalan aspekton, ĉar ĝi staras fronte al nova dinamiko, kaj ĝi havas viglan forton, kiu ŝanĝas la mondon; temas pri malgranda forto, ĉar kvankam katolikoj estas unu miliardo kaj 200 milionoj - klarigas la Papo – multaj, kiuj aspektas esti en ĝi, tamen estas ekster ĝi. Kvankam estas vera ankaŭ la malo: multaj, kiuj aspektas ekster la Eklezio, tamen estas en ĝi.

La Papo, siaflanke, ne havas la povon

Aperis la libro “Lumo de la Mondo”, kiu entenas intervjuon kun la Papo: 280 paĝoj en kiuj Benedikto la 16a senpere kaj sincere parolas pri si kaj pri multaj temaroj el la vivo de la Eklezio kaj de la mondo.

La libro-intervjuo estas la transskribo de la interparolo, kiun la Papo faris kun ĵurnalisto Peter Seewald, pasintsomere en Kastelgadolfo.

altrudi ion ajn: li estas nur viro, kiu devas doni ateston al Tiu, kiu estis krucumita. Fronte al la kritikoj kaj atakoj Benedikto la 16a diras: “se mi daŭre ricevas nur konsentojn, mi devus demandi al mi mem, ĉu mi vere anoncas la Evangelion”.

Multaj estas la temaroj pritraktitaj en la intervjuo. Seksaj trouzoj: ili estis renversigaj; inter la multaj analizoj pri la problemoj la Papo memorigas la fakton, ke ekde la jaroj 60aj regis la konvinko laŭ kiu la Eklezio ne devas esti “Eklezio de juro”, sed “Eklezio de la amo”, ke ĝi ne devus puni. Malfortiĝis tiel la konscio ke la puno povas esti amo-ago.

Aidoso: la Papo diras ke la Eklezio estas la unika institucio vere proksima al la personoj ĉar ĝi prizorgas multajn malsanulojn; kaj li redeklaras, ke oni ne povas solvi la problemon per disdono de kondomoj: necesas fari multon plian. Li mencias kelkajn kazojn en kiuj la uzo de kondomo estus “unua ago de respondecigo”, “unua paŝo al pli humana sekseco”, prefere ol ne uzi ĝin, elmetante la aliulon je vivorisko, sed la Eklezio ne taksas la kondomojn aŭtentikan kaj moralan solvon de la problemo. Jen la frazoj, kiuj plej sensaciis en la mondo, ĉar amaskomunikiloj anoncis, ke la Papo “rajtigas la kondomojn”, dum liaj vortoj estis aliaj.

Seksa moralo: la Papo substrekas ke la Eklezio devas esprimi laŭ nova maniero la pozitivecon de la korpo kaj de la sekseco.

↳ *daŭrigo en paĝo 75*

I.K.U.E. HAVAS NOVAN STATUTON

La 9an de decembro 2010 en urbo Milano (Italio) sub kontrolo de notario okazis la fina fazo de la proceduro aprobita de la ĝenerala Kunveno de IKUE 2010 en Parizo, por la reformo de la statuto, pere de letera referendumo, surbaze de nova teksto pretigita de la estraro.

La reformo de la statuto fariĝis necesa ĉar la ĝis nun valida teksto datiĝis de 1977 kaj oni konstatis, ke ĝiaj normoj – ne la principoj, sed la normoj kiuj aranĝas la gvidorganojn – ne plu korespondis je la efektiva situacio de la katolika E-movado, kaj oni volis enkonduki la utiligon de modernaj elektronikaj rimedoj por rapida kaj malmultekosta laboro de la IKUE-organoj. Al ĉio tio aldoniĝis la fakto, ke la tro strikta interdependo inter la diversaj roloj en la statutaj taskoj multe malfaciligis ĉiujn decidojn de la gvidorganoj.

Do, laŭ la normoj mem de la statuto de 1977, oni lanĉis perleteran referendumon, en kiu povis partopreni, laŭ la oficialaj kondiĉoj, la balotrajtaj IKUE-anoj de la kategorio “membro abonanto”. Ĉiujn alvenintajn balotilojn oni kalkulis en la sidejo de notario Lainati en Milano.

Ĉar temis pri sufiĉe solena momento en vivo de la Unuiĝo, en la fina kalkulo partoprenis la prezidanto, Miloslav Šváček, kaj alvenis el Ĉeĥa Respubliko post vojaĝo sufiĉe laciga ĉar la flugo malfruis 4 horojn pro veteraj kondiĉoj.

Ĉeestis krome la ĝenerala sekretario de IKUE, Carlo Sarandrea, kaj aliaj italaj IKUE-anoj, kelkaj el ili estas estraranoj de ĝia itala sekcio: d-ro Gianfranco Polerani, d-

ro Giovanni Daminelli, Giovanni Conti kaj Antonella Ruggeri Sarandrea.

La rezulto de la referendumo estis protokolita de la notario en oficiala akto. Rajtis partopreni en la baloto: 282 membroj. Sendis balotilon: 156 (proks. 55,32%). Aprobis la reformon de la statuto: 152; malaprobis la reformon de la statuto: 1; sendis blankan balotilon: 1; 2 balotiloj estis nuligitaj pro evidenta malrespekto de la balot-reguloj (unu balotilo entenis skribajn rimarkojn, la alia, malfrue alvenis).

La akto per kiu oni sankcias la aprobon de la nova IKUE-statuto estis registrita la 20an de decembro 2010. Nun oni proponas ĝin al la ekleziaj aŭtoritatoj, por la renovigo de la agnosko, kiun en 1992 la papa Konsilio de laikoj donis al IKUE.

La laboro farita ekde la kongreso en Parizo (julio) ĝis la akto en Milano (decembro) estis granda kaj – ni diru tion – ĝi kuntrenis sufiĉe da elspezoj por IKUE, pro la pago de impostoj kaj de la notaria honorario.

Kaj la laboro ne finiĝis: nun fronte al la Unuiĝo staras plia grava laboro: transdoni al IKUE la juran posedon de ĝia Centra Oficejo, kiu, ĝis nun, laŭ interkonsento de la fora jaro 1994 (vidu EK 8-9-10/1994, paĝo 142) estas titolita je la ĝenerala sekretario. Plie, ni devos relanĉi nian agadon: kvankam neniu certas, ke la nova estas perfekta statuto, tamen oni ne dubas, ke ĝi donos gravan impulson al relanĉo de nia Unuiĝo dum la venontaj jardekoj. Sed pli ol baziĝi je statutaj normoj, ni pli kaj pli fidu je la dia Providenco kaj je la patrineca ŝirmado de Nia Sinjorino de la Espero.

KELKAJ NOVAĴOJ ENKONDUKITAJ EN LA STATUTO

- 1) oni mencias la la agnoskon de la Sankta Seĝo;
- 2) plia Patrono estas Papo Johano Paŭlo la 2a;
- 3) aldoniĝis karitato al la movadaj agadoj;
- 4) eniris la statuton la oficialigo de la Ekumenaj Kongresoj, de la religia Konsilanto kaj de la Konsilio de la Kontorevizoroj; plie: oni fiksas novajn kategoriojn de membroj kaj oni enkondukis la uzon de interreto kaj retroŝto por la laboroj de la Unuiĝo;
- 5) ne plu estas la plenumkomitato (kiu praktike ne plu funkciis ekde jardekoj) kaj oni precizigis la povojn de la Prezidanto kaj de la Estraro laŭ la plej kutimaj juraj normoj koncerne reprezentantecon; tiel same, la statuso de la landaj, regionaj kaj fakaj Asocioj estis multe pli difinita.

STATUTO DE INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Historio de la IKUE-Statuto. La unua IKUE-statuto estis akceptita en Parizo 1-4-1910, modifita 23-7-1966 en St. Gallen, ĝi estis reviziita 19-8-1977 en Ĉenstohovo kaj la saman jaron prezentita al la Sankta Seĝo. Ĝi estis registrita en Romo 3-2-1978. La Sankta Seĝo aprobis ĝin per dekreto de la Papa Konsilio por Laikoj per dekreto 196/92/S-61/B-25 de la 11-2-1992. La Ĝenerala Kunveno de IKUE 2010 okazinta en Parizo (Francio) la 30-6-2010 rajtigis la Estraron proponi al membraro novan Statuton kaj per perletera balotado oni aprobis ĝin. La nuna teksto estis registrita en Milano (Italio) la 20-12-2010 kaj poste prezentita al la Sankta Seĝo por aprobo.

TITOLO 1 — NOMO – SIDEJO - PATRONOJ

ARTIKOLO 1 - Nomo

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (ekde nun “IKUE” aŭ “la Unuiĝo”), fondita la 1-an de aprilo 1910 en Parizo kaj agnoskita de la Papa Konsilio por Laikoj per dekreto 196/92/S-61/B-25 de la 11-a de februaro 1992, estas tutmonda senprofitcela privata asocio de esperantistaj katolikoj laŭ la n-roj 321 ĝis 326 de la Kanonjura Kodo de la Katolika Eklezio.

ARTIKOLO 2 - Sidejo

La sidejo de IKUE estas ĝia Centra Oficejo en Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 Romo, Italio.

La translokado de la sidejo, decidita de la Estraro de IKUE, ne implicas statutan ŝanĝon, sed komunikon al la kompetentaj oficejoj.

ARTIKOLO 3 - Patronoj

La ĉielaj patronoj de IKUE estas: la Dipatrino de la Espero, Pio la 10-a, Maksimiliano Kolbe, Titus Brandsma, Johano Paŭlo la 2-a.

La Estraro povas peti eminentajn personojn patrone protekti IKUE, ĝiajn kongresojn, instituciojn kaj simile per sia influo kaj aŭtoritato.

TITOLO 2 — CELOJ – AGADO – RIMEDOJ – ADMINISTRACIA JARO

ARTIKOLO 4 - Celoj

IKUE celas, pere de la lingvo Esperanto, realigi pure religian, eklezian kaj laikan sperton, kiu estu esence katolika kaj apostola kaj specife ĝi celas:

- a) plenumi la ordonon de Jesuo Kristo: “Iru en la tutan mondon kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo” (Mar 16,15); travivi kaj atesti la belecon de la vero kaj la ĝojon esti kristanoj, por estigi fervoregon por la Regno de Dio;
- b) montri la unuecon de la Eklezio en Kristo, uzante la internacian lingvon Esperanton en ĝia liturgio kaj apostola agado;
- c) kontribui al realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco en la nuntempa mondo;
- d) strebi “por ke ĉiuj estu unu” (Joh 17,21).

ARTIKOLO 5 - Agado

Por atingi siajn celojn IKUE:

- a) kunlaboras rekte kun la katolika Hierarkio, starigita de la Sinjoro por regi la Eklezion, en rilato de plena kunuleco kaj konfido. Akceptas memdispone ĝian gvidadon kaj proponas al ĝi per respondeca agado la uzon de la lingvo Esperanto kiel rimedon por apostolado kaj paŝtista agado;
- b) kontaktas diversajn ekleziajn instancojn, instituciojn kaj organizaĵojn por informado kaj por interkonsenti formojn de kunlaboro;
- c) kunlaboras en frateco kaj reciproka servado kun la diversaj asocioj, agadoj kaj grupoj de katolika apostolado kaj partoprenas kune kun ili en la komunaj kunligaj organoj;
- d) realigas iniciatojn de karitato kaj mizerikordo, ankaŭ en kunlaboro kun la supre menciitaj instancoj;
- e) prizorgas liturgiaĵojn laŭ la normoj kaj tekstoj en Esperanto aprobitaj de la Eklezio;
- f) akcelas, per kaj por Esperanto, iniciatojn por formado kaj edukado, kiel komunumoj, kolokvoj, kongresoj, renkontiĝoj kaj kursoj, ĉefe religiaj, por preĝi, studi, mediti kaj labori, por persona spirita pliriĉiĝo, favore al kristana esperantista agado kaj por la edukado de aktivuloj;
- g) aranĝas - laŭeble ĉiujaran – propran Kongreson laŭ la normoj kaj kondiĉoj fiksitaj de la

koncerna regularo aprobita de la Estraro. La Kongreso povas esti aranĝata kune kun aliaj kristanaj esperantistaj asocioj (“ekumena Kongreso”) surbaze de specifa regularo harmonie interkonsentita kun la menciitaj asocioj;

- h) instigas al starigo de landaj, regionaj aŭ fakaj katolikaj sekcioj ;
- i) eldonas oficialan organon “Espero Katolika” kaj religiajn, liturgiajn kaj ekleziajn dokumentojn kaj tekstojn en Esperanto;
- j) alprenas promociajn iniciatojn, por diskonigo kaj informado, produktante kaj/aŭ disdonante publikigaĵojn kaj aŭdvidan materialon koncerne siajn celojn;
- k) disponigas laŭpete al aliaj esperantistaj asocioj siajn servojn, kondiĉe ke la petata kunlaboro ne kontrastu kun ĉi tiu Statuto.

ARTIKOLO 6 – Rimedoj

Por sia agado IKUE utiligas, aldone al siaj organizaj strukturoj, ankaŭ la volontulan laboron faritan de ĉiuj, kiuj volas subteni la Unuiĝon.

La kapitalo de IKUE konsistas el moveblaj kaj nmoveblaj havaĵoj alvenintaj al ĝi. Specife, la kapitalo de IKUE konsistas el la valoraĵoj meminitate disponigataj de la membraro mem kaj/aŭ de triuloj, el fondusoj, asignaĵoj kaj rezervoj starigitaj por financado, el la kontribuoj, donacoj kaj postlasaĵoj de unuopuloj, asocioj, societoj, institucioj kaj el ĉiuj ajn aliaj rimedoj, kiujn formale akceptas la Prezidanto, kondiĉe, ke tion ebligu la leĝaro de la lando, en kiu IKUE havas sian sidejon, kaj ke ilia alcelo kaj uzo ne estu en kontrasto kun ĉi tiu Statuto.

La enspezoj de IKUE konsistas el:

- a) membrokotizoj;
- b) mondonacoj faritaj de membroj, nemembroj, institucioj kaj triuloj;
- c) enspezoj el manifestacioj, kongresoj aŭ aliaj agadoj faritaj pro la celoj de IKUE;
- d) enspezoj el fruktoj de utiligo de la kapitalo;
- e) kontraktoj, kiujn formale akceptas la Prezidanto aŭ ties Prokuristo, post konsultado kun la aliaj membroj de la Estraro, rilate al moveblaĵoj, nmoveblaĵoj, financaj kaj aliaj ĉiuspecaj operacioj faritaj kun la celo havigi al si ĉu la posedon de sia sidejo kaj de eventualaj aliaj sidejoj, ĉu la posedon de ĉiuspeca havaĵo aŭ rajto, kiu utilu por ebligi aŭ plibonigi la efikon de la organizado kaj la bonan realigon de la celoj.

Estas malpermesata la divido tra la membroj kaj nemembroj de la kapitalo kaj de ĉiu ajn enspezo kiuj konsistigas la rimedojn de la Unuiĝo, eĉ per nerektaj manieroj. La eventualan enspezon el la fina jara bilanco oni devas reutiligi por la celoj preskribitaj de ĉi tiu Statuto.

ARTIKOLO 7 – Administracia jaro

La administracia jaro daŭras de la unua de januaro ĝis la 31-a de decembro de ĉiu jaro. Ene de unu monato post la fermo de la administracia jaro la Kasisto redaktas la koncernan bilancon, kiun la Estraro, post aprobo kaj kun raporto pri ĝi de la Konsilio de la Kontorevizoroj, proponas al la Asembleo por definitiva aprobo, kune kun raporto pri farita agado kaj gvidlinioj por agadprogramo.

TITOLO 3 — LANDAJ, REGIONAJ Aŭ FAKAJ SEKCIOJ / IKUE-REPREZENTANTOJ

ARTIKOLO 8 – Landaj, regionaj aŭ fakaj sekcioj

La Estraro povas aprobi kaj/aŭ iniciati landajn, regionajn aŭ fakajn sekciojn, aŭ akcepti kiel tiajn ariĝon de esperantistaj katolikoj, kiuj petas esti branĉo de IKUE je loka nivelo aŭ havi fakan karakterizon.

La landaj aŭ regionaj sekcioj plenumas la celojn de IKUE en la naciaj aŭ regionaj teritorioj kaj agas per la nomo “sekcio de IKUE” kun indiko de la lando aŭ regiono, en kiu ili agas, aŭ per la nomo, kiun ili elektis.

La landaj aŭ regionaj sekcioj, kiuj volas esti branĉo de IKUE, alprenas aŭ konformigas se jam ekzistantan, propran regularon aŭ Statuton, kiu estu harmonia kun ĉi tiu Statuto kaj respiegulu naciajn aŭ lokajn leĝojn, karakterizojn, agadkampojn.

La membroj de landaj aŭ regionaj sekcioj, kiuj ne pagas IKUE-aliĝkotizon, estas konsiderataj “aligitaj membroj de IKUE” (AM) aŭ “aligitaj junaj membroj” (AMJ) se malpli ol 25-jaraĝaj, nur en la kazo ke la respektiva sekcio pagas por ĉiu el ili minimuman kotizon fiksitajn de la Estraro de IKUE interkonsente kun la sekcio mem. Aligita membro de sekcio ne ricevas la oficialan organon de la Unuiĝo. IKUE ne respondecas pri la sindevigoj alprenitaj de la landaj aŭ regionaj sekcioj, Ili estas administracie memstaraj strukturoj.

La agadoj kaj iniciatoj de landa aŭ regiona sekcio, kiuj havu efikon el internacia speco devas esti

unuope interkonsentitaj kun la Estraro de IKUE.

La fakaj sekcioj plenumas la celojn de ĉi tiu Statuto gvidante la agadon de la IKUE-membroj arigitaj surbaze de specifa kategorio de personoj aŭ celgrupo, ekzemple, sed sen elĉerpa indiko, laŭ aĝo, laŭ profesio, laŭ kulturaj, religiaj, spiritaĵaj karakterizoj, laŭ specifaj projektoj ktp. La fakaj sekcioj laboras laŭ propra regularo, kiu estu harmonia kun ĉi tiu Statuto. La Estraro de IKUE aprobas ĉiujn jurajn kaj organizaĵajn aspektojn de la rilatoj de IKUE kun la fakaj sekcioj.

Ĉiuj sekcioj devas prezenti al la Estraro jarajn raportojn pri farita agado kaj estonta agadprogramo. Ne estas antaŭvidita aprobo de la raportoj fare de la Estraro de IKUE.

Al la Estraro de IKUE apartenas la tasko solvi la kontrastojn, kiuj ekstaras inter la sekcioj kaj/aŭ inter ili kaj IKUE mem, kaj ĝi povas malagnoski tiun sekcion, kies celoj kaj agadoj ne plu korespondas je la celoj de IKUE aŭ kiuj uzas la nomon de IKUE por celoj kaj agadoj fremdaj je IKUE. La decidojn de la Estraro koncerne sekcion devas ratifiki la Asembleo de IKUE per simpla plimulto da voĉdonantoj, se la koncernatoj prezentas apelacion.

ARTIKOLO 9 – IKUE-Reprezentantoj

Por la landoj aŭ regionoj, en kiuj ne estas nek eblas la starigo de sekcio, la Estraro povas nomumi personon, kiu estu IKUE-Reprezentanto kun la tasko reprezenti la aferojn de IKUE antaŭ landaj aŭtoritatoj – ŝtataj, ekleziaj, esperantistaj - laŭ la direktivoj kaj per la helpo de la Estraro. La IKUE-Reprezentanto ankaŭ varbas novajn membrojn, kolektas kotizojn kaj sendas ilin al la IKUE-Kasisto. Ĉi tiun peradon por la aliĝkotoj la Estraro povas ankaŭ interkonsenti kun alia esperantista asocio, kiu fariĝas “peranto de IKUE”.

TITOLO 4 — MEMBRARO

ARTIKOLO 10

Membro de IKUE povas fariĝi ĉiu, kiu akceptas ĝian Statuton kaj pagas jaran aliĝkoton, kies koston fiksas la Estraro respektante la diverslandajn ekonomiajn situaciojn. La jara aliĝkoto ne estas repagebla nek transdonebla al alia persono krom en la kazo de morto, ĉiuokaze sen revaluto. La Estraro de IKUE povas fiksi procenton da komision por ĉiu kolektita aliĝkoto favore al sekcio, Reprezentanto aŭ Peranto kiu kolektis ĝin. Ĉiu aliĝo, malaliĝo, morto, forfalo, forigo de membro estas notita en la libro de la membraro, fare de la Sekretario de IKUE.

Oni distingas ses kategoriojn de membroj:

- a) membroj-abonantoj (MA): ili pagas ordinaran kotizon;
- b) membroj-subtenantoj (MS): ili pagas ĉiujare almenaŭ la duoblan ordinaran kotizon;
- c) membroj dumvivaj (MD): ili pagas unufoje 30-oblan ordinaran kotizon;
- d) membroj kunvivantaj familianoj de alia IKUE-membro (MF); junaj membroj, kiuj ankoraŭ ne fariĝis 25-jaraĝaj je la 31-a de decembro de la jaro al kiu rilatas la pagata membrototizo (MJ): ili pagas la duonon de la ordinara kotizo;
- e) la “aligitaj membroj” (AM-AMJ) menciitaj en artikolo 8 de ĉi tiu Statuto;

La Estraro de IKUE povas nomi Honoraj Prezidantoj (HP) aŭ Honoraj Membroj (HM) membrojn de IKUE, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda katolika Esperanto-Movado kaj havis eksterordinarajn meritojn por IKUE. La nomumoj okazas laŭ regularo aprobita de la Estraro de IKUE.

Ĉiuj membroj, escepte de la membroj-familianoj (MF) kaj la aligitaj membroj (AM-AMJ), ricevas la oficialan revuon.

Ĉiuj membroj, kiuj atingis sian 18-an vivojaron je la tago de malfermo de la Asembleo, havas voĉdonrajton po unu voĉo en la Asembleo de IKUE, kondiĉe, ke ili pagis la aliĝkoton je la dato de la Asembleo.

ARTIKOLO 11

La IKUE-membrecon oni perdas, aldone al la kazoj de morto kaj rezigno, ankaŭ pro forfalo kaj forigo.

La forfalo okazas, kiam membro ne pagas la jaran membrototizon ene de la 30-a de junio de la posta aliĝ-jaro.

La forigon decidas la Estraro laŭ la preskriboj de la artikolo 18 de ĉi tiu Statuto; ĝis la decido de la Asembleo validas tiu de la Estraro.

TITOLO 5 — ORGANOJ DE LA UNUIĜO

ARTIKOLO 12

Organoj de la Unuiĝo estas:

- a) la Asembleo;
- b) la Estraro;
- c) la Prezidanto;
- d) la Konsilio de la Kontorevizoroj.

ARTIKOLO 13 - Asembleo

La Asembleo, konsistanta el la membroj de la Unuiĝo, havas la taskon decidi pri ĉi tiuj temoj:

- a) elekto de la Prezidanto;
- b) elekto de la Estraro kaj de la Konsilio de la Kontorevizoroj ;
- c) aprobo de la jaraj raportoj pretigitaj – ĉiu laŭ sia kompetenteco - de la Estraro kaj de la Konsilio de la Kontorevizoroj pri agado, financa bilanco, havaĵoj, gvidlinioj por agadprogramoj;
- d) ratifiko aŭ ne de la forigo de membroj decidita de la Estraro;
- e) ŝanĝo komplota aŭ parta de la Statuto;
- f) dissolvo de IKUE;
- g) iu ajn alia temo proponita al ĝia pridecido.

Ordinare la Asembleo devas okazi almenaŭ unu fojon jare, kadre de la Kongreso de la Unuiĝo aŭ de iu alia esperantista aranĝo, aŭ en alia loko decidita de la Estraro, aŭ per letero.

La Asembleo povas okazi ekstervice, kiam en la tagordo estas la punktoj e), f) kaj g) de ĉi tiu artikolo. La Asembleon kunvokas la Prezidanto de la Unuiĝo pere de letero, kiu indikas lokon, daton, horon kaj temojn de la kunsido, enpoŝtigita almenaŭ 30 tagojn antaŭ la dato fiksita por la kunsido.

En kazoj de urĝeco la kunvokon oni povas fari per telegramo aŭ fakso, kun alsendo almenaŭ 15 tagojn antaŭ la okazigo de la Asembleo.

La kunvoko estas sendita nur pere de elektronika poŝto, ankaŭ “registrata”, al tiuj membroj, kiuj akceptas ricevi komunikojn per ĉi tiu rimedo.

La temojn por diskuti en la tagordo decidas la Estraro. Al ili aldoniĝas la proponoj prezentitaj de la membraro, kiuj, en skribita formo kaj motivigitaj, devas atingi la Sekretarion almenaŭ tri monatojn antaŭ la okazigo de la Asembleo, kondiĉe ke ilin prezentu unu dudekono de la membroj aŭ ilin subskribu 2 Kontorevizoroj.

Pri la eventualaj temoj ne listigitaj en la kunvokilo la voĉdono de la Asembleo validas nur kiel rekomendo.

La membro povas reprezentigi sin fare de alia membro pere de skribita delegilo, prezentenda al la gvidorganoj de la Asembleo je la komenco de ĝiaj laboroj. Ĉiu membro ne povas havi pli ol 3 delegilojn.

Ĝenerale – escepte de la kazoj alimaniere normigitaj de ĉi tiu Statuto - la Asembleo estas valida kun kiu ajn nombro da partoprenantaj membroj kaj ĝi alprenas decidojn per la favora voĉo de la simpla plimulto de la ĉeestantoj, kiuj rajtas je voĉdono, inkluzivante la delegilojn. La membroj de la Estraro kaj de la Konsilio de la Kontorevizoroj ne rajtas voĉdoni dum la Asembleo por la aprobo de la jaraj agadraporto kaj bilanco.

Membroj, kiuj ne povas partopreni en la Asembleo, nek volas delegi alian membron, povas voĉdoni per letero por la elekto de la Prezidanto, de la Estraro kaj de la Konsilio de Kontorevizoroj, por la aprobo de la estrara raporto kaj por la bilanco. Oni konsideras ilin partoprenantaj en la Asembleo nur por la menciitaj farendaj decidoj.

Por la kontrolo de skribaj voĉdonadoj la Asembleo elektas inter la ĉeestantoj komisionon el maksimume 3 membroj, ne membroj de la Estraro.

Pri la ordinaraj kaj ekstervicaj Asembleoj oni faras protokolojn en taŭga libro, subskribitajn de la Prezidanto kaj de la membro ĉiufoje elektita de la Asembleo kiel Sekretario.

Ekstervican Asembleon povas peti al la Prezidanto almenaŭ unu triono de la membraro, kiuj rajtas je voĉdono, per peto, kiu entenu la proponitan tagordon. La Estraro decidas pri loko, tago kaj horo de la petita kunvoko de Asembleo, kiu ĉiuokaze ne povas okazi pli malfrue ol 6 monatojn post la ricevo de la peto.

La Estraro povas decidi, ke unuopaj decidoj pri proponoj aŭ elektoj, por kiuj ĉi tiu Statuto ne preskribas fizikan ariĝon de membroj, okazu ne dum Asembleo ĉu ordinara ĉu ekstervica, sed per letera voĉdono de la tuta membraro. La Estraro redaktas regularon pri ĉiuj kazoj de perleteraj voĉdonoj.

ARTIKOLO 14 - Estraro

La Unuiĝon administras Estraro konsistanta el la Prezidanto kaj el 5 membroj, elektitaj de la Asembleo surbaze de listo de kandidatoj. Al ili aldoniĝas la religia Konsilanto, laŭ la Kanonjura Kodo n-ro 324§2, kiu estas sacerdoto jam elektita en la Estraro, aŭ, se ne, alia kooptita de la Estraro.

La Estraro redaktas la regularon por la prezento de la kandidatiĝoj, kiuj ĉiuokaze devas atingi la Centran Officejon de IKUE almenaŭ 3 monatojn antaŭ la dato de la elekto. Ĉiuokaze la kandidatoj devas esti membroj de la Unuiĝo ekde tri sinsekvaj jaroj, inkluzive de la jaro, en kiu okazas la elekto, kaj devas havi la kapablon kaj eblecon plene engaĝiĝi por la laboro de la Estraro kaj devas esti minimume 18-jaraĝaj je la dato de la elekto.

Por la validigo de kandidatiĝoj decidas la Sekretario de IKUE surbaze de la preskriboj de ĉi tiu artikolo. En kazoj de duboj li interkonsiliĝas kun la Prezidanto. La decidon pri nekandidatebleco kaj la koncernajn motivojn oni devas komuniki al la koncernata persono.

La Estraro estas elektita por 4 jaroj kaj ĝiaj membroj estas ĉiam denove rekandidateblaj por nova elekto, krom en la kazoj de forfalo aŭ forigo menciitaj de la artikolo 11 de ĉi tiu Statuto.

Se la rezulto de la elekto prezentas du aŭ pliajn kandidatojn kun la sama nombro da ricevitaj voĉoj por la lasta elektenda membro, tiu, kiu estas pli maljuna, estas elektita.

La Estraro dividas inter si la funkciojn de: unua Vicprezidanto, dua Vicprezidanto, unu Sekretario, unu Kasisto. La Estraro povas decidi aliajn oficialajn funkciojn por dividi inter siaj membroj. La Estraro povas decidi, ke du aŭ pliaj funkcioj estu alprenitaj de la sama persono.

La Vicprezidantoj helpas kaj konsilas la Prezidanton, anstataŭas lin en la kazoj kaj laŭ la manieroj indikitaj en artikolo 15.

La Sekretario faras protokolojn pri la kunsidoj de la Estraro; konservas kaj ĝisdatigas la librojn de la protokoloj kaj la libron de la membraro; validigas la kandidatiĝojn je la Estraro surbaze de la preskriboj de ĉi tiu artikolo kaj de la regularo aprobita de la Estraro; prizorgas la korespondadon ankaŭ elektronikan de la Unuiĝo. En kazo de malhelpo li estas portempe anstataŭata de alia estrarano.

La Kasisto redaktas la jaran bilancon. Li prizorgas ĉiujn financajn kaj monajn operaciojn, laŭ indikoj de la Estraro aŭ de la Prezidanto. En la Asembleo li raportas pri la financa stato de la asocio. Li estas ankaŭ peranto ĉe la kasistoj de landaj aŭ regionaj ligoj kaj aliaj esperantistaj aŭ neesperantistaj asocioj.

La religia Konsilanto havas la taskon spirite gvidi kaj subteni la vivon de IKUE; li donas siajn indikojn pri la liturgiaj celebroy kaj kontrolas ke la agado de IKUE respektu la kanonjurajn kaj statutajn normojn. Se li estas kooptita de la Estraro li partoprenas per konsulta voĉo en la estraraj kunsidoj.

La Estraro havas la taskojn:

- a) apliki la statutajn celojn ankaŭ surbaze de la decidoj de la Asembleo;
- b) iniciati jurajn procedurojn por la rekompensado de materiaj damaĝoj suferitaj de la Unuiĝo; por la koneksaj farendaĵoj la Prezidanto rolas mem reprezentante de la tuta Unuiĝo aŭ pere de unu aŭ pli personoj de li delegitaj; se la alcelato de la jura proceduro estas la Prezidanto mem, la Unuiĝon reprezentas oficiale unu el la Vicprezidantoj aŭ alia Estrarano elektita de la Estraro.
- c) decidi ĉiujare la sumon de la ordinara membrototizo;
- d) decidi pri la starigo de aŭ fermo de lokaj sidejoj kaj/aŭ la akcelon de landaj, regionaj aŭ fakaj sekcioj aŭ la tranĉon de rilatoj kun ili ;
- e) starigi komisionojn, ĉu teknikajn, ĉu sciencajn, ankaŭ en kunlaboro kun aliaj katolikaj aŭ religiaj asocioj, grupoj, movadoj, kiuj donu fakan konsultadon aŭ mastrumu specifajn partojn de la agadoj de la Unuiĝo. La regularo de ĉiu Komisiono estas interkonsentita de la Estraro kun la koncernataj partioj;
- f) decidi pri la kunvoko de la Asembleo;
- g) proponi al la decido de la Asembleo la temojn de ĝia kunsido aldonajn al tiuj listigitaj en artikolo 13, kaj, se petita de la koncernato, la apelacion de membro kontraŭ la eksigo decidita de la Estraro mem;
- h) redakti ĉiujare la agadraporton, la bilancon kaj la gvidliniojn de la agadprogramo;
- i) elekti la ĉefredaktoron de la oficiala organo "Espero Katolika";
- j) fiksi la ĝeneralajn kondiĉojn por okazigo de la Kongreso de IKUE, inkluzive de la nomumo de organiza Komitato, se alia ol la Estraro, kaj la laŭstatuta alceligo de eventuala fina enspezo.

La Estraro kunsidas, post kunvoko de la Prezidanto aŭ post peto de pli ol la duono de ĝiaj membroj, almenaŭ 3 foje jare. La kunvokojn oni devas dissendi almenaŭ 15 tagojn antaŭ la kunsido, se okazas en fizika loko, aŭ 5 tagojn antaŭ la kunsido, se ĝi okazas pere de elektronikaj komunikiloj. Kaze de urĝaj

decidoj la kunvoko povas okazi pere de telefonvoko kaj sen la respekto de la supraj datlimoj. En ĉi-lasta kazo la protokolo de la kunsido devas enteni la motivojn, kiuj igis necesa la urĝan kunvokon. Pri la kunvoko de kunsido de la Estraro devas esti informita la Konsilio de la Kontorevizoroj, kies membroj povas partopreni en la kunsido sen rajto je voĉdono.

La kunsidoj de la Estraro povas okazi ankaŭ pere de la uzo de elektronikaj komunikiloj, kiel aŭd- kaj videokonferenco, telefono, interreta babilejo.

Por la validado de la decidoj de la Estraro necesas la partopreno kaj la favora voĉo de la simpla plimulto de la membroj. En kazo de para voĉo decidas la Prezidanto.

Pri la kunsidoj de la Estraro oni redaktas protokolojn en taŭga libro, subskribitajn de la Prezidanto kaj de la Sekretario.

Malelektiĝas el la funkcio la estrarano, kiu ne plu estas membro de la Unuiĝo pro ĉiu ajn motivo, aŭ kies forigon decidas unuanime la aliaj estraranoj, aŭ kiu ne partoprenas, sen prava motivo komunikita antaŭ la kunsido, en 3 sinsekvaj kunsidoj de la Estraro.

Kaze ke membro eliras el la Estraro pro iu ajn motivo, la Estraro anstataŭigas lin ĝis la fino de la deĵor-periodo per la kandidatoj, laŭ la vico de la ricevitaj voĉoj en la elektoj. Se ne estas kandidatoj je dispono, la Estraro prizorgas la rekompletigon de sia konsisto pere de kooptado, kondiĉe ke estu ankoraŭ almenaŭ la duono de la elektitaj membroj; male, la Konsilio de la Kontorevizoroj kunvokas la Asembleon por elekto de nova Estraro.

Ekde la kunvoko de balotado la membroj de la Estraro restas agantaj por la nura ordinara administrado ĝis la unua kunsido de la nova Estraro, kiu devas okazi ene de unu monato post la baloto.

ARTIKOLO 15 - Prezidanto

La Prezidanto estas la leĝa Reprezentanto de la Unuiĝo fronte al triuloj kaj en procesoj.

Lin elektas la Asembleo kaj li funkcias dum 4 jaroj. Li estas ĉiam reelektebla.

Taskoj de la Prezidanto estas:

- a) kunvoki oficiale kaj prezidi la Asembleon de la membroj kaj la kunsidojn de la Estraro;
 - b) gvidi la agadon de la Unuiĝo inkluzive de la kunordigo de la funkcioj de la diversaj estraranoj, kun aranĝo de oftaj personaj kontaktoj inter ili por interŝanĝi konsilojn kaj stimuli ĉiujn al agado kaj reciproka kunlaboro;
 - c) reprezenti la Unuiĝon fronte al religiaj kaj civilaj aŭtoritatoj;
 - d) respondi, prizorgi kaj mastumi ĉiujn farenadaĵojn, kiujn la leĝoj de la lando, en kiu la Unuiĝo havas sian sidejon, aŭ ĉi tiu Statuto ne rezervas al la Asembleo aŭ al aliaj organoj, koncerne la agadon, organizadon kaj funkciadon de la Unuiĝo, inkluzive de ĝia Centra Oficejo.
- Krome la Prezidanto, kun la skribita aprobo de unu el la Vicprezidantoj, havas la povon:
- a) agi, transakcii, akordigi, iniciati, establiĝi kiel defendanto, rezisti, disponi, ankaŭ en juraj agadoj, koncerne la rajtojn de la Unuiĝo;
 - b) aprobi financajn operaciojn el eksterordinara administracio;
 - c) akcepti donacojn kaj postlasaĵojn, kun benefico de inventaro, koncerne moveblaĵojn kaj nmoveblaĵojn, ankaŭ tiujn postlasitajn de forpasinto, en la respekto de la celoj de la Asocio sankciitaj de ĉi tiu Statuto kaj en la respekto de la leĝoj validaj en la lando de la sidejo de la Unuiĝo, kaj post konsultado kun la aliaj membroj de la Estraro

Ĉiuokaze se la Prezidanto ne havas la civitanekon de la lando, en kiu IKUE havas sian oficialan sidejon, kaj kiam tia civitaneco estas postulata fare de la leĝoj, kutimoj, regularoj kaj de similaj preskriboj ĉu ŝtataj ĉu publikaj kaj de privataj instancoj de la lando, en kiu IKUE havas sian sidejon, li estas anstataŭata por ĉiu povo preskribita de ĉi tiu artikolo fare de la Prokuristo nomumita laŭ la preskriboj de artikolo 19.

La Prezidanto povas skribe delegi personon je sia konfido roli anstataŭ li por unu aŭ pluraj el la agadoj menciitaj en la supraj punktoj, ne rezervitaj al la Prokuristo en la lando de la IKUE-sidejo.

Kaze ke la Prezidanto estu malebligata plenumi sian funkciadon, lin anstataŭigas portempe la unua Vicprezidanto, aŭ, kaze ke ankaŭ ĉi-lasto ne povas ofici, la dua Vicprezidanto. Se la anstataŭigo de la Prezidanto daŭrus dum pli ol 12 monatoj, aŭ se li eksiĝas aŭ estas unuanime eksigita de la tuta Estraro, aŭ mortas, la unua Vicprezidanto, aŭ se tiu ne povas, la dua Vicprezidanto fariĝas Prezidanto de IKUE ĝis la fino de la laŭstatuta ofico de la Estraro. Se ambaŭ Vicprezidantoj ne povas agi kiel Prezidanto, la Konsilio de la Kontorevizoroj kunvokas la Asembleon por elekto de nova Prezidanto kaj Estraro.

Ĉiuokaze la Prokuristo de la Prezidanto en la lando de la IKUE-sidejo restas funkcia, ankaŭ en la neceso devi elekti antaŭtempe novan Estraron, ĝis kiam nova Prezidanto ne decidu alimaniere.

ARTIKOLO 16 - Konsilio de la Kontorevizoroj

La Konsilio konsistas el 3 membroj elektitaj de la Asembleo kune kun la Estraro, surbaze de listo de kromaj kandidatoj minimume 18-jaraĝaj, kiuj povas ankaŭ ne esti membroj de la Unuiĝo, kondiĉe ke ĉi-kaze ili estu proponitaj de membro, kaj ke ili parolu Esperanton. Post elekto ĉiuj revizoroj devas ĉiukaze esti membroj de IKUE por ofici. La deĵoro-tempo de la Konsilio koincidas kun tiu de la Estraro samtempe elektita.

Por la validigo de kandidatiĝoj decidas la Sekretario de IKUE surbaze de la preskriboj de ĉi tiu artikolo. En kazoj de duboj li interkonsiliĝas kun la Prezidanto. La decidon pri nekandidatebleco kaj la koncernajn motivojn oni devas komuniki al la koncernata persono.

Por la validigo de kandidatiĝoj la Estraro povas ankaŭ decidi surbaze de specifaj personaj kvalifikecoj ligitaj kun mastrumado de financaj administracioj.

La Konsilio de la Kontorevizoroj havas la taskon kontroli la financajn kaj kontokalkulajn rezultojn de la asocio, la konsiston de la havaĵoj ĉiufoje, kiam ĝi taksas tion oportune kaj prezentas jaran raporton pri la jarbilanco kaj kapitalo al la Asembleo. Por la konstatoj la Konsilio povas delegi unuopajn siajn membrojn. La Kasisto de IKUE devas disponigi sian helpon kaj kunlaboron al la Konsilio.

La Konsilio elektas inter siaj membroj prezidanton, kiu ennome de la Konsilio tenas ĉiujn oficialajn kontaktojn kaj komunikojn kun la Estraro kaj la Asembleo de IKUE.

La Konsilio kunsidas laŭ kunvoko de ĝia prezidanto aŭ post peto de unu el ĝiaj membroj, aŭ laŭ peto de la Kasisto de IKUE kaze de bezono de konsultado.

Kaze, ke membro eliras el la Konsilio pro iu ajn motivo, nova konsiliano fariĝas ĝis la fino de la deĵor-periodo la kandidato, laŭ la vico de la ricevitaj voĉoj en la elektoj. Se ne estas kandidatoj je dispono, aŭ se ĉiuj Konsilianoj eksigiĝas, la Estraro de IKUE nomumas ekstermovadan profesionan fakulon.

TITOLO 6 — SENPAGECO DE LA ASOCIAJ FUNKCIOJ

ARTIKOLO 17

Ĉiuj funkcioj en la Unuiĝo estas farataj senpage.

Oni antaŭvidas repagon de elspezoj eltenitaj de la Prezidanto, de la membroj de la Estraro, de la Konsilio de Kontorevizoroj kaj de iu ajn taskita membro por la plenumo de specifaj, porokaze aljuĝitaj, aprobitaj taskoj kaj laboroj, kaj por ĉio koneksa al tio, kion oni aprobis.

Se iu ajn membro de la Estraro, inkluzive de la Prezidanto, faras meminiacie elspezon, kiu ne ligiĝas kun enprogramita agado kaj ordinara administrado kaj/aŭ estigita de enantaŭvidebla evento, la Estraro devos decidi dum la unua posta kunsido, ĉu agnoski repagon.

Por la plenumo de agado, kiu implicu la faradon de konstantaj agadoj, kun rimarkinda disponigo de persona tempo, la Estraro povas rajtigi konstantan kompenson, kiu estu kongrua, laŭ la lokaj leĝoj sed ĉiukaze interkonsente kun la taskito.

TITOLO 7 — DISCIPLINAJ PUNOJ

ARTIKOLO 18

La Estraro rajtas apliki disciplinajn punojn, se membro de IKUE, ankaŭ estrarano, plenumas agojn aŭ faras publikajn deklarojn aŭ havas konduton, kiuj estas kontraŭ la statutaj preskriboj, kontraŭ la defendo de la kredo kaj kontraŭ la Instruado de la katolika Eklezio, aŭ estigas moralajn kaj/aŭ materiajn damaĝojn al IKUE.

La disciplinaj punoj estas:

- a) verkita admono;
- b) ĉesigo portempa el la funkcio;
- c) forigo el la Unuiĝo.

La verkita admono estas letero adresata al la koncernato, per kiu la Estraro petas klarigi la motivojn de la kontestata faro kaj certigon, ke tio ne plu okazu.

La ĉesigo portempa el la funkcio povas esti decidita de la Estraro, kun eventuala indiko de daŭro, ankaŭ en la kazo, ke oni devas esplori pri la kontestataj faktoj.

La forigo el la Unuiĝo validas senlime, almenaŭ ĝis kiam la Estraro ne konstatas kompletan ŝanĝiĝon de la situacio, kiu estigis la forigon. La forigo de membro ĉiukaze devas esti konfirmita de la Asembleo, kiu estas kunvokita laŭ la preskriboj de artikolo 13. Se la Asembleo ne ratifikas la forigon, la decido perdas valoron, sen ke tio estu motivo por malelekto de la decidinta Estraro.

Kaze ke la kontrastoj fariĝu nesolveblaj aŭ kaze ke la tuta Estraro de IKUE fariĝas alcelato de propono de puno, la religia Konsilanto petas al la Ekleziaj Aŭtoritatoj interveni por la taŭĝaj decidoj.

La Estraro pere de sia Prezidanto aŭ alia taskito povas iniciati jurajn procedurojn por la rekompensado de materiaj damaĝoj suferitaj de la Unuiĝo.

TITOLO 8

PROKURISTO DE IKUE EN LA LANDO, KIE ESTAS LA SIDEJO DE LA UNUIĜO

ARTIKOLO 19

Kaze, ke la Prezidanto de IKUE ne havas la civitanecon de la lando en kiu estas la oficiala sidejo de IKUE, la Prezidanto nomumas sian Prokuriston kun tia civitaneco, kiu surprenas ĉiujn povojn kaj rajtojn de la Prezidanto de IKUE por laŭleĝaj, juraj kaj ekonomiaj administradoj en la lando de la oficiala sidejo de IKUE, inkluzive de taskoj asignitaj de la Estraro al la Prezidanto kaj de la farendadoj ligitaj kun la mastrumado de la Centra Oficejo.

La nomumon ne devas ratifiki la Estraro nek la Asembleo.

La nomumo estas sankciita per oficiala akto laŭ la preskriboj de la leĝoj de la lando, en kiu devas roli la Prokuristo.

La nomumo de nova Prokuristo, kiu anstataŭigas la antaŭan, estas decidita de la Prezidanto mem surbaze de persona volo aŭ kaze de ŝanĝo de la lando, en kiu estas la IKUE-sidejo.

TITOLO 9 — ŜANĜO DE LA STATUTO – DISSOLVO DE IKUE

ARTIKOLO 20 – Ŝanĝo de la Statuto

Ŝanĝon partan aŭ kompletan de ĉi tiu Statuto povas proponi al la Asembleo la Prezidanto, la Estraro aŭ almenaŭ du trionoj de la membroj.

La ŝanĝo de la Statuto estas valida, se partoprenas en la voĉdonado almenaŭ du trionoj de la membroj kaj aprobas ĝin plejmulto el ili.

La teksto de la proponitaj ŝanĝoj devas esti en la kunvokilo de la Asembleo, kiu devas okazi laŭ unu el la manieroj priskribitaj en artikolo 13.

La aprobata ŝanĝo de la Statuto estas submetenda je la Eklezia Aŭtoritato, kies decido estas definitiva.

ARTIKOLO 21 – Dissolvo de IKUE

La membroj de IKUE povas decidi la dissolvon de la Unuiĝo per la favora voĉo de 4/5 (kvar kvinonoj) de la voĉdonantoj, kiam ĉeestas 3/4 (tri kvaronoj) de la membraro dum Asembleo arigita en antaŭanoncigitaj loko, dato kaj horo. Ne eblas alpreni decidon pri dissolvo de IKUE per letera balotado nek per alia rimedo malsama ol fizika arigo de personoj.

Se la dissolvo de IKUE estas aprobata laŭ la kondiĉoj priskribitaj en la antaŭa alineo de ĉi tiu artikolo, la Asembleo nomumas likvidanton, kiu, laŭ la decido de la fina Asembleo, prizorgu la disdonon de ĉiuj havaĵoj de IKUE favore al la Eklezio aŭ al alispecaj katolikaj institucioj, kiuj havas celojn kiel eble plej kongruajn kun ĉi tiu Statuto.

TITOLO 10 — FINA DISPOZICIO

ARTIKOLO 22

Por ĉio, kio ne estas preskribita de ĉi tiu Statuto, validas la normoj de la Kanonjura Kodo de la Katolika Eklezio kaj/aŭ tiuj de la leĝaro de la lando, en kiu estas la oficiala sidejo de IKUE, kaj/aŭ la regularoj kiujn la Estraro de IKUE povas aprobi ankaŭ en diversaj tempoj, depende de la specifaj kazoj, harmonie kaj kongrue kun la celoj de IKUE mem.

RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21.20 MET (20.20 UTC)

DIMANĈE - daŭro 8' - frekvencoj: *MO* 1530 kHz - *KO* 4005, 5885, 7250, 7435 kHz.

MERKREDE KAJ ĴAŬDE - daŭro 9' - frekvencoj: *MO* 1260, 1611 kHz - *KO* 6185, 7355 kHz.

Satelite: Eutelsat Hot Bird 13° Est (Eŭropo), Bouquet RAI / Intelsat AOR (Atlantiko), IS 801, 328,5° E / Intelsat IOR (Hindio), IS 904, 60° E

Rete: www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

Arkivo: www.radio-vatikana-esperanto.org

Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.

Skribu al: **RADIO VATIKANA - ESPERANTO**

SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO

Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provokzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

↳ *daŭrigo de paĝo 65*

Abortigo: Benedikto la 16a reliefigas ke la socio priŝtelas de si mem siajn grandajn esperojn, forprenante la vivon de la infanoj, kiuj estas hompersonoj. Kiom da nenaskitaj infanoj estus povintaj fariĝi geniuloj, kiuj donus al la mondo novajn aferojn.

Sekve, la Papo redeklaras la starpunktojn de la Eklezio pri fraŭleco, pri la pastreco de la virinoj kaj pri samseksamo; pri ĉi-lasta li diras: “la respekto por la persono estas absolute fundamenta kaj decida, sed ne pro tio samseksameco fariĝas morale ĝusta. Krome, ĝi ne estas kongrua kun la pastra servado”.

Katolikoj divorcintaj kaj regeedziĝintaj: la Papo rimarkas, ke ĝi estas tre malfacila temo, kiu meritas pliprofundigon.

Dialogo kun Islamo: Benedikto la 16a rememorigas ke la parolado en Regensburg de 2005 volis esti leciono pure akademia: “mi ne konsciis, ke la parolado de la Papo ne estas taksata el akademia vidpunkto, sed laŭ tiu politika. Kaj tamen tiu evento donis pozitivajn fruktojn, ĉar fontis dialogo vere tre intensa”.

Pio la 12a kaj la decido agnoski liajn heroecajn virtojn: la Papo diras ke li estis unu el la grandaj justuloj, kaj ke, kiel neniu alia, li savis multajn hebreaĵojn. Li ne faris publikan proteston kaj li suferis multe pro tio, ĉar li sciis, kiuj estus la postsekvoj.

“Kazo Williamson”: la Papo diras ke li ne forigus la ekskomunikon se li sciis antaŭe ke li malagnoskis la ekziston de gas-kameroj.

Ekumenismo: Benedikto la 16a redeklaras la urĝon de la sindevigo por la unueco de la kristanoj.

Antaŭkoncilia Meso: li volis igi pli facile alirebla la malnovan formulon, por konservi la seninterrompan ligon kiu restas en la historio de la Eklezio. “Ni ne povas diri: antaŭe ĉio estis erara, nun ĉio estas korekta”.

Katolika doktrino pri la neerarebleco de la Papo: klariginte, ke ĝi ĉeestas nur en specifaj cirkonstancoj kaj nur laŭ specifaj kondiĉoj,

Benedikto la 16a diras, ke logike papo povas ankaŭ havi erarajn personajn opiniojn. Papo rajtas kaj ankaŭ devas demisii kiam li konscias, ke li ne plu kapablas fizike, mense kaj spirite, plenumi la ricevitajn taskojn.

En la libro-intervjuo la Papo pritraktas ankaŭ malpezajn kaj personajn temojn, kiel la preferatajn filmojn kaj la mankon ne povi fari ekskurson aŭ simplan promenadon en la urbo. Tamen, li ne vivas izolita en artefarita mondo, ĉirkaŭata de korteganoj. “Mi opinias, ke malmultaj en la mondo renkontas tiom da personoj kiom mi. Multegaj estas la leteroj de simplaj fideluloj, kiuj instigas min”.



memorigas la kritikojn ricevitajn ĉar li surmetis malnovan mezepokan papan ĉapon, kiun uzis lastfoje Papo Johano la 23a: ĝi estis okazo por akuzi lin “reveni al pasinteco”. La Papo klarigis tion jene: “Mi

simple frostis, kaj la kapo estas por mi tre delikata punkto”.

Fine, Benedikto la 16a memorigas ke la Eŭkaristio estas la centra evento de la historio de la mondo, kaj nur el ĝi povas fondi ŝanĝiĝoj. Pro tio la sanktuloj, puŝitaj de Kristo, estas la veraj revoluciuloj, realigantoj de veraj revolucioj de bono. Ni ne povas diri kiam la mondo finiĝos, sed Jesuo, per nefaligebla certeco, diris al ni: “Mi revenos”.

Maria indikas al ni la esencaĵon, kiun ofte ni ne plu sukcesas vidi: kredo, espero, amo, pentofaro. En la atendo de la venko de bono – diras la Papo – necesas memori, ke la triumfoj de Dio, la triumfoj de Maria estas silentaj, kaj tamen realaj.



MIAJ KVAR VOTOJ KIEL JEZUITO

Pastro Stefano Hawkes-Teeple, kies voĉo estas konata de la aŭskultantoj de la E-elsendoj de Radio Vatikana ĉar li estas ilia kunredaktoro, faris solenan ordenpromeson de kvar votoj kiel membro de la Kompanio de Jesuo. La malriĉeco, la ĉasteco kaj la obeado estas votoj de multaj religiaj ordenoj, sed la jezuitoj faras kvaran voton akcepti iun ajn mision de la Papo. La rito okazis en la festotago de la Senmakula Koncipiĝo (8.12.2010), en la patrina preĝejo de la Jezuitoj en Romo (en pluraj lingvoj konata kiel “la Gesù”).

Jen liaj sentoj dum tiu grava ceremonio, per la vortoj de pastro Stefano mem.

La eldiro de la votoj estis neforgesebla sperto, el pluraj vidpunktoj.

Dum la ceremonio mi surhavis la belegajn ornatojn de mia pastra ordino **(1)**: ili estis mirinda donaco al mi farita de paroĥo sankta Gregoro la Teologo de Lakewood, Ohio. Kiam mi estis diakono mi pasigis du somerojn ĉe tiu tre gastameca komunumo. La ornatoj brilis ore kaj blanke. Mi iel “kompatis” miajn kunfratojn de la latinrita tradicio, ĉar iliaj liturgiaj vestaĵoj malpli brilis.

Unu el la memorindaj momentoj okazis komence de la prediko de la Superulo de la jezuita ordeno, pastro Adolfo Nicolás: preskaŭ ĉiuj lumoj elŝaltiĝis kaj alarmosireno komencis aŭdiĝi. Sen la lumo oni ja povus pli malpli bone daŭrigi, sed tiu akra sono malebligis aŭskulti ion ajn alian. Ĝi estis metaforo pri la kristana vivo en la nuna mondo: oni ne bone vidas, ni antaŭeniras per la fido, kun iom da lumo tie kaj tie. Sed ankaŭ kiam ni deziras tutkore aŭskulti la Parolon de Dio, la krio de la mondo ĉirkaŭ ni estas tro laŭta.

Mi aŭskultis iun, kiu diris ion, pri kio mi samopiniis: “Tiel ĉi aspektis ĉi tiuj preĝejoj

dum la vesperaj liturgioj, kiam ne ekzistis elektra lumo. Estis kelkaj kandeloj, sed ĉefe multe da malhelo”.



Dank’ al Dio, komence de la eŭkaristia preĝo, kiam la superulo diris: “La Sinjoro estu kun vi”, elektro refunkciis kaj tiu malplaĉa alarmo ĉesis.

Laŭ la tradicio de nia ordeno, tuj antaŭ la komunio, ni ok alproksimiĝis unu post la alia al la Pastro Superulo kaj genuiĝis fronte al li por eldiri niajn kvar ordenajn votojn. La situacio kortuŝis min, estante jezuito, kiu faras sian solenan promeson en la preĝejo en kiu estas la tombo de sankta Ignaco, surgenuie fronte al la Superulo mem, kiu estas granda gvidanto, kiun mi tre ŝatas. Mia voĉo sufokiĝis. Mi paŭzis dum unu sekundo,



mi profunde enspiris kaj mi kompletigis la eldiron de ĉiuj la 4 votoj.

Tuj post la fino de la Meso, ankoraŭ kun la ornattoj, ni faris procesion tra la tuta preĝejo. Ni supreniris multajn ŝtupojn, ni eniris la ĉambretojn en kiuj sankta Ignaco vivis. Tie ni eldiris la 5 simplajn votojn de nia ordeno. Unu el ili estas la promeso ne klopodi fariĝi episkopo; alia estas ne klopodi fariĝi superulo de la jezuita ordeno... du votoj, pri kiuj mi tute ne povas imagi ilian malobeon...

Ni revenis al la sakristio kaj ni demetis la ornattojn, Mi surmetis la supran sutanon (greke: εξώρασον: ruslingve: ряса - riassa) sur tiu malsupra(ruslingve: подрясник) kaj poste mi iris por genuiĝi por la dua fojo je la piedoj de la Superulo. Li prenis mian ĉapelon kun la veloj (ruslingve: Клобук - klobuk) kaj li metis ĝin sur mian kapon.



Elirinte el la sakristio, estis multaj geamikoj, kiuj atendis dum eĉ 20 minutoj post la Meso por saluti min. Tio estis tre kortuŝa afero. Multaj kisoj kaj ĉirkaŭbrakoj. Tie ĉi en Italujo ankaŭ la viroj donas kison sur la du vangoj. Surprizis kaj kortuŝis min la fakto, ke multaj geesperantistoj de Romo kaj ĉirkaŭa regiono venis al la Meso.

Tiun saman vesperon okazis regalado por la novaj votintoj, en Kolegio Bellarmino. Mi parolis kun multaj gastoj kaj multegaj jezuitaj kunfratoj. Inter ili estis pastro Federico Lombardi, ĝenerala direktoro de Radio Vatikana. Li havas tre delikatan kaj devontigan laboron en la radio kaj ankaŭ en la gazetara salono de la Sankta Seĝo, sed li estas ĉiam tre ĝentila kaj afabla kun ni, de la eta elsendo en Esperanto. Ofte li demandas al ni, kiel progresas nia laboro, kvazaŭ ĝi estus unu el liaj pli gravaj prizorgendaĵoj.

La postan tagon, mia religia komunumo, la Papa Instituto por Orientaj Studoj, aranĝis festan tagmanĝon. Kaj vendrede mi kun miaj gastoj el ekster Italujo vespermanĝis en bona restoracio. Ĝi estis eksterordinara vespero.

Ĉiuj celebroy kaj solenoj estis mirindaj kaj ili tre plaĉis al mi, sed nun mi pretas, pli malpli, reveni al mia ĉiutaga vivo.

P. Stefano HAWKES-TEEPLES, S.J.

(1) Stefano estas pastro de la rutena grekokatolika Eklezio: laŭ ĝia tradicio oni uzas la samajn vestaĵojn de la ordiniĝo en Pasko kaj dum specialaj okazaĵoj.

Espero Katolika gratulas al pastro Stefano, dezirante al li spiritrice, fruktodonan, apostolan agadon.



† PASTRO FELICE RUARO

24/12/1920 – 21/10/2010

Nekrologo aperinta en ĵurnalo “Avvenire” de la itala episkoparo konigis la malfeliĉan sciigon pri la forpaso de kara pastro IKUE-ano: Felice Natale Ruaro. La funebran sciigon publikigis la episkopo de lia diocezo, Verono (Italio), monsignoro Giuseppe Zenti, kiu la 23an de oktobro ankaŭ celebris la funebran riton por li, kiu estis lia iama instruisto, menciante lian esperantistecon.

Pastro Ruaro naskiĝis en Schio (Vicenza, Italio) antaŭtage de Kristnasko 1920 kaj pro tio li estis nomita Felice Natale (“Feliĉa Kristnasko”). Li studis en Verono, kie li sacerdotiĝis la 27an de junio 1943: li estis tre juna ĉar tiam la teologiaj studoj daŭris kvar jarojn (nun ses).

Sed, ni legu lian biografion, kiun li mem verkis.

«Post la sacerdotiĝo mi pasigis 4 jarojn en la seminario, kun la tasko esti asistanto de la vicrektoroj kaj kun la ebleco doni spiritan helpon en paroĥoj de Rovere, San Vitale kaj San Tommaso Cantuariene. Oktobre de 1947 mi fariĝis animzorganto en San Giovanni in Valle, por helpi la maljunan paroĥestron pastro G. Bonometti. Tie la estonta sankta Giovanni Calabria (1873-1954) arigis la unuajn knabojn por sia bonfara agado kaj kiam mi atingis la urbeton lia agado jam faris gigantajn antaŭenpaŝojn. En la paroĥa teritorio jam staris la centro San Zeno in Monte, en kiu estis la ĉefdomo de la agado kaj vivis la fondinto, kiun mi ekkonis. Multaj studentoj de lia “Domo Bonaj Infanoj” estis miaj lernantoj en la supera gimnazio de la seminario, kune kun la seminarianoj kaj studentoj de alia lernejo.

Mi ĝojis povi doni mian etan kontribuon por la kultura formado de multaj studentoj, kvankam mi konsciis, ke la estontaj pastroj plenumos sian paŝtistan servadon ankaŭ sen la uzo de la latina kaj greka lingvoj. Post la paŝtista agado en San Giovanni in Valle, mi laboris en neparoĥa preĝejo San Toscana kaj, poste, dum 12 jaroj, mi estis rektoro de la malgranda pilgrimloko “Dipatrino de la Sano”. Ekde 1943 ĝis 1965 mi instruis la italan, la latinan kaj grekan lingvojn. Multaj miaj lernantoj ricevis kun la paso de la jaroj grandajn respondecojn; kelkaj fariĝis episkopoj: inter ili, mons-ro Eugenio dal Corso [hodiaŭ episkopo de Benguela, Angolo, ndlr] kaj mons-ro Giuseppe Zenti [unue episkopo de Vittorio Veneto kaj hodiaŭ de Verono, ndlr].

Novembre de 1965 okazis turnopunkto en mia vivo. Necesis pastro, kiu konu la germanan lingvon por la nova tombejo de la germanaj soldatoj en Costermano, pro la bedaŭrinda, abrupta forpaso de la paroĥestro, pastro Zamperoli, kiu konservis bonajn rilatojn kun multaj germanoj, speciale kun la parencoj de la Falintoj. Tial, por daŭrigi tiun agadon, mian nomon oni faris al la episkopo, mons-ro Carraro. Mi fariĝis paroĥestro de Costermano kun la tasko paŝtiste prizorgi la loĝantaron kaj la germanan tombejon. Mi tuj ekkontaktis multajn germanojn, mi celebris multajn Diservojn, ĉefe ekumenajn; krome, dum la someroj mi celebris Mesojn en multaj vilaĝoj borde de la lago [de Garda, ndlr] por la germanlingvaj katolikoj. Mi havis la okazon geedzigi multajn geŝtanojn el Germanio, kiuj volis celebri la geedziĝon en loko al ili tre kara.

Kiam mi rezignis je paroĥestrado pro sanstato, mi fariĝis animzorganto de malsanulejo “Vilao Garda”. En 1996, kun mia fratino jam 94-jaraĝa, mi ekloĝis en “Domo Perez” [domo por emeritaj pastroj, tuj apud la ripozdomo, starigita en Negrar fare de la ordeno de sankta Giovanni Calabria, ndlr].

Pastro Felice RUARO

Negrar, la 15an de oktobro 2009

(elitaligis, kun resumo, CS)

En “Domo Perez” patro Ruaro vivis ĝis sia forpaso. Lia lasta apero en esperantista medio okazis en 1999, kiam li kuncelebris Meson dum la 68a Itala Kongreso de Esperanto en Riva del Garda (Trento).

La jaroj de maljuneco estis karakterizitaj de malĝojaj momentoj – kiel la forpaso de lia fratino Gina la 22an de decembro 2006, 104-jaraĝa – kaj de ĝojaj momentoj – kiel la omaĝado al li okaze de lia diamanta jubileo kiel pastro en 2003 kaj la vizito, kiun faris al li en 2007, lia episkopo kaj iama lernanto, mons-ro Zenti.

Ĉi-lasta, reage al kondolencna letero sendita ennome de IKUE, tiel respondigis: «*Ĝentila S-ro Sarandrea, la Episkopo de Verono, L.E. mons-ro Giuseppe Zenti, legis, kun kortuŝita plezuro, Vian tre estimatan leteron de la 22a de oktobro 2010, per kiu Vi, ennome de la Unuiĝo, prezentante vian kondolencnon pro la forpaso de pastro Felice Ruaro, memorigas, aldone al lia spirita figuro de pastro “animata de granda kompato”, lian kontribuon por Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Episkopo mons-ro Zenti petas al mi informi Vin ke*



Jen la bileto per kiu pastro Ruaro sin prezentis al la legantoj de EK en numero 9/1971, la unua de li komplete redaktata.



SALUTO DE LA NOVA REDAKTORO

Karaj gelegantoj,
mi prezentas min al vi kun miaj plej koraj salutoj. Kiam mi sendis la gratulojn al la nova Prezidanto de IKUE, mi skribis, ke mi estas preta helpi lin ĉu tradukante, ĉu sendante kelkan artikolon.

Pastro Longoni, kiu jam serĉis redaktoron en Norditalujo, esprimis al mi la deziron, ke mi bonvolu akcepti la taskon de redaktoro aŭ almenaŭ serĉi taŭgan redaktoron.

Mi montris, koncerne min, iujn malfacilaĵojn: la tasko estus tute nova por mi; mi estas paroĥestro; plue mi instruas kaj korespondas kun multaj familianoj de la 22.000 germanaj soldatoj ripozantaj en la germana « Soldatenfriedhof » de mia vilaĝo.

Bedaŭrinde aliaj spertaj kaj malnovaj esperantistoj ne akceptis la taskon. Tial mi akceptis por tri jaroj la seriozan kaj malfacilan taskon de redaktoro. Sed mi fidus je la helpo de ĉiuj IKUE-anoj. Kiel diris la Prezidanto, la redaktado de nia revuo estas komuna interesiĝo de ĉiuj.

Do ni atendas viajn raportojn pri via agado, viajn sugestojn, proponojn, dezirojn... Tial nia revuo pliriĉigos kaj plibeligiĝos, estos interesanta ligilo inter la katolikaj esperantistoj, fidela spuglo de la vivo de IKUE. Oni ne fermos la revuon, kiel iuj timas, al seriozaj progresemaj tendencoj, sed certe ĝi estos tre fidela al la katolika fido, al la instruado de la S. Seĝo kaj de la episkoparo.

Bedaŭrinde oni devos kelkfoje prokrasti la publikigon de via materialo aŭ elpreni nur parton de via sendaĵo, t.e. la plej interesan parton. Memkompreneble ne estas eble kontentigi ĉiujn, sed ni faros ĉion eblan por kontentigi. aprobindajn dezirojn.

Ne sendu al mi monon, ĉar mia tasko estas nur redakcii.

Ni sendis la unuajn kajerojn de la « nova » E.K. al 1600 adresoj kaj nun atendas la rezultojn kun granda espero.

Mi salutas vin tutkore. Dio benu nin ĉiujn kaj nian agadon por la disvastigo de la kristanaj ideoj. Pastro FELICE RUARO

dum la prediko, aldone al memorigo pri spiritaĵ kaj paŝtistaj karakterizoj, kiujn Vi ankaŭ ekkaptis, menciis lian longan kaj neŝanĝitan pasion por la studo, pliprofundigo kaj instruo (interalie ĉiam tute senpaga) de la lingvoj, kaj aparte de esperanto.

Lia Ekscelenco kaptas la okazon de ĉi tiu [letero] por sendi al Vi sian patrecan saluton kaj la benon de la Sinjoro.

Mi profitas la okazon por havigi al Vi distingitajn salutojn.

Verono, el la dioceza Kurio

*la 29an de oktobro 2010
La Episkopeja Kanceliero
pastro Francesco Grazian».*

Nia dankemo estu granda al Sinjoro pro ĉio, kion pastro Ruaro faris, aparte por Espero Katolika.

Ni levu preĝon por ke la Sinjoro akceptu lin inter siajn sanktulojn.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe informante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La baza jara kotizo de membroabonanto estas 25€, sed ĝi varias laŭ la lando: petu informojn rekte de la landaj reprezentantoj.

Se Via lando ne estas listigita ĉi tie, bonvolu kontakti rekte la Centran Oficejon de IKUE.

Membroj de IKUE rajtas aboni tra IKUE la KELI-revuon "Dia Regno" kontraŭ 10,00€. Membroj de KELI rajtas aboni EK kontraŭ 12,50€, pagendaj al la KELI-kasisto.

Argentino	Daniel A. Cotarelo García, Rivera Indarte 232 P.1 A, RA-1406 Buenos Aires
Aŭstrio	Hans M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, A-1230 Wien <i>EK-peranto:</i> Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg
Belgio	Walter van den Kieboom, Wapenplein 17 - 8 , B-8400 Oostende
Brazilo	Lejsester J. Flores Mirò, Seminário Paulino 8556, Via Raposo Tavares km 18,5, Jd Arpoador, BR-05576-200 São Paulo SP <i>EK-peranto:</i> Brazila E-Ligo, C.P. 03625, BR-70084-970 Brasília DF
Burundio	Jean Thomas Mishosi Birindwa, B.P. 781, Bujumbura
Ĉeĥa Resp.	Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice
Danlando	Eugeniusz Rybarczyk, Bispeparken 29.1th, DK-2400 Copenhagen NV
Estonio	Vjačeslav Hromov, p.k. 623, EE-12602 Tallinn
Francio	Anne-Marie Chaney, 56 rue Corvisart, F-75013 Paris
Germanio	Hans Moser, Gasteiner Str. 31, D-10717 Berlin
Hungario	P. Lajos Kóbor, H-9484 Pereszteg
Italio	Giovanni Daminelli, Via Lombardia, 37, I-20099 Sesto S.Giovanni
Japanio	Hatiroo Matubara, Namimatu-tyo 4/5, 596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
Kongo	Jean Bosco Malanda Lutete, B.P 761, Kinshasa XI
Kroatio	Marija Belošević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb
Kubo	Alberto José García Fumero, Calle 26 No 3313 E/33 y 35 Playa CP-11300 Ciudad Habana
Latvio	Jazeps Šlars, Zvaigžņu 20-26, 1009 Riga
Litovio	Adomas Mečislavas Grikpedis, A. Povilaičio 12-200, LT-2050 Vilnius
Nederlando	Simon Paul Smits, Deken Tomaslaan 32, NL-4453 AL 's-Heerenhoek
Nov-Zelando	Mike Leon, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt
Pollando	Janina Trzpił, al. Wyszyńskiego 5F m 20, PL-21-560 Miedzyrzec Podlaski
Portugaliao	Portugala E-Asocio, rua Dr J.Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa
Rumanio	Ioan Weiss, Str. Traian Nr. 28 Ap. 22, RO-430044 Baia Mare
Slovakio	Pavol Petřík, Na Dujave 3, SK-082 56 Pečovská Nová Ves
Tajlando	P. Marcel Perray, G.P.O. Box 1846, Bangkok 10501